Vi lernos, kaj praktikos:

Kiu(n)? => Tiu(n)
Kiuj(n)? => Tiuj(n)

° Kiu persono legas?

° Tiu persono legas.
° Tiu legas.
° Li legas.
° Pablo legas. KTP

° Kiu tramo venas?

° Tiu tramo venas.
° Tiu venas.
° Tramo 3 venas. KTP

° Kiuj gelernantoj surhavas okulvitrojn?

° Tiuj gelernantoj surhavas okulvitrojn.
° Tiuj surhavas okulvitrojn.
° Tiuj.
° Ili. KTP

° Kiuj pomoj estas freŝaj?

° Tiuj pomoj estas freŝaj.
° Tiuj.
° La pomoj sur la tablo. KTP

° Kiun melonon vi preferas?

° Mi preferas tiun melonon.
° Mi preferas tiun.
° Tiun.
° La melonon dekstre de la ananaso. KTP

° Kiujn tomatojn vi deziras?

° Mi deziras tiujn tomatojn.
° Mi deziras tiujn.
° Tiujn.
° La ruĝajn, maturajn tomatojn. KTP